

8. Referencoj

Abroug, T (1978): *Analýza tréninkového procesu hráče vicholové kopané se zaměřením na střelbu. Diplomová práce. Fakulta tělesné výchovy a sportu Univerzita Karlova, Praha.*

Abroug, T (1980): *Výběr práce s talentovanou mládeží v ČSSR. Rigorozi práce. Fakulta tělesné výchovy a sportu Univerzita Karlova, Praha.*

Pour une plus grande effectivité de l'entraînement en football

L'auteur cite les résultats de ses expériences concernant les possibilités d'élever le niveau de rendement des joueurs de football dans les clubs de première division en Tchécoslovaquie, le Dukla de Prague et le Baník Ostrava.

Dans cette thèse, l'auteur concentre son attention quant aux possibilités d'améliorer les capacités de base pour les joueurs de football (les passes, le tir, les duels aériens, le jeu de tête) et la résolution des situations qui impliquent du jeu (coup de coin, touche, coup-franc direct ou indirect...).

Cette thèse montre que même avec une préparation physique impeccable (endurance, résistance, vitesse, force) ils existent encore des points faibles pour amélioration du rendement des joueurs de football. Pour éliminer ces points faibles, il faut améliorer le niveau des capacités de base citées ci-dessus et l'exercice accentué des situations qui impliquent du jeu et déjà citées.

La sindefendologio enkadre de AEST 1981

Okaze de la 1-a konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tehniko en Ĵilino *Žilina* 1981, d-ro Václav Hník prelegis pri *everto* transdorsoĝeto kaj ĝia rilato al ĵudoĝeto *seoinago* (japane: *seoi-nage*). La aŭtoroj de la prelego estas J. Novák, I. špička kaj la preleganto. Post enkonduko oni priskribis la transdorsoĝeton kaj klarigis ankaŭ ties meĥanisman. En plua parto de la prelego estas klarigitaj eblecoj, kiamaniere oni povas ĵeti kontraŭulon helpe de ia apogaĵo (ekzemple kokso, dorso, suba parto de dorso k.t.p.). Tio poste ebligis al la aŭtoroj analizi la seoinagon. Fine oni komparis meĥanisman de la transdorsoĝeto kun meĥanismo de la ĵudoĝetoj, kiuj estas en literaturo nomataj seoinago. La aŭtoroj montris, ke everto seoinago ne estas laŭ sia meĥanismo unu batalago, sed evertgrupo, kiu plej verŝajne entenas ankaŭ la transdorsoĝeton. La traktaĵo estas presita en preleg-kolekto el la konferenco. Represaĵoj estos haveblaj fine de tiu ĉi jaro ĉe d-ro Hník.

L. Špaček

Tradiciaj formoj de la korpokulturo en Etiopio

Mekonnen Jemaneh (Etiopio)*

1. Enkonduko

Pozicion kaj evoluon de la korpokulturo, simile kiel de la kulturo mem, determinas materialaj kondiĉoj por la vivo de la socio. Jam ekde antikva tempo ekzistis edukado, antaŭ ĉio korpa, kiu havis praktikan utilan karakteron kaj partoprenis ĉe preparado de la homoj al labora aŭ batala agado. Simile kiel en aliaj landoj ankaŭ nia popolo de longe kreadis diversajn formojn kaj metodojn de la korpokulturo. Multaj sportoj havas en nia lando sian analogion en malnovaj popolaj korp-ekzercoj kaj ludoj. Tiuj estas kohera parto de nia popola kulturo. Kiel konsistaĵo de tradicio, tiuj ĉi sportoj estas transdonataj spontane de generacio al generacio. Ili esprimas naturan sopiron de homoj, speciale de la junaj, moviĝi. Spite al tio, ke ne ekzistas skribitaj reguloj aŭ manieroj de konkursado, ekzistas buŝe transdonataj reguloj, kiuj estas ĝenerale konataj kaj strikte observataj. Signifo de la popolaj tradicioj estas granda ankaŭ tial, ke ili servas ne sole por evoluado de movokapablo kaj lerteco, sed ili estas por vilaĝanoj ankaŭ parto de kultura vivo kaj rimedo servanta al reciproka komunikado.

2. Naĝado

Naĝado simile kiel irado estas ĝis nun antaŭ ĉio natura ekzercado kaj sole duavice sporta fako. Por iuj partoj de nia lando naĝado estas viv-neceso kaj ĝia estiĝo kaj evoluo malvaste rilatas al la geografiaj kondiĉoj. Reto de etio-

* PhDr., Sports and physical culture commission, p.o. 60X, 3241 Addis Abeba, Etiopia.